Raymond Schwartz,

# Pli bone .... (Naiva kanzoneto)

Pli bone estas teni
Birdeton en la man'
Ol dudek birdojn ... vidi
Sur supro de platan'!

Pli bone estas pagi
Kotizon al la grup'
Ol frankojn mil malŝpari
Kun diboĉema pup'!

Pli bone estas stari
En plena veturil'
Ol sidi en malplena
Stomak' de krokodil'!

Pli bone estas sidi
Sur pajlo de karcer'
Ol kuŝi en la ĉerko
Du metrojn sub la ter'!

Pli bone estas kanti
Eĉ laŭ malĝusta ton'
Ol senrespekte ... tusi
En mezo de salon'!

...

Raymond Schwartz,

# Viel besser ist's .... (Ein naives Liedchen)

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Viel besser ist's zu halten
Ein Vöglein in der Hand
Als zwanzig Stück ... zu sehen
Von fern am Waldesrand!

Viel besser ist's zu zahlen
Den Beitrag an den Verein
Als viel Geld zu verschwenden
Mit 'nem leichten Mägdelein!

Viel besser ist's zu stehen
Im Bus mit Leuten viel
Als liegen in dem Magen
Von einem Krokodil!

Viel besser ist's zu sitzen
Im Knast für ein'ge Zeit
Als in 'nem Sarg zu liegen
In alle Ewigkeit!

Viel besser ist's zu singen
Wenn auch mit falschem Ton
Als rücksichtslos zu husten
In einem feinen Salon!

...

Pli bone estas pinĉi
Knabinon en la krur'
Ol tikli episkopon
Ĉirkaŭe de tonsur'!

Pli bone estas senti
Kiseton sur vizaĝ'
Ol senti aŭ ricevi
Piedon sur postaĵ'!

Pli bone estas skribi
Insultojn per krajon'
Ol sendi komplimentojn
Per kuglo de kanon'!

Pli bone estas manĝi
Bifstekon kun buter'
Ol nutri sin per amo,
Promesoj kaj esper'!

Pli bone estas plugi
La kampojn en oaz'
Ol sarki tro obstine
En truoj de la naz'!

...

Viel besser ist's zu kneifen
Ein Mädchen in den Po
Als nachts gebissen werden
Im Bett von einem Floh![2]

Viel besser ist's zu fühlen
Ein Küsschen auf dem Mund
Als eine Tritt zu spüren,
Das ist nicht so gesund!

Viel besser ist Beschimpfung
Mit Bleistift auf Papier
Als freundliche Begrüßung
durch einen Kanonier!

Viel besser ist's zu essen
Ein großes Bratenstück
Als leben von der Liebe
Und hoffen auf das Glück!

Viel besser ist's zu pflügen
Den Acker voller Müh'
Als in der Nase bohren
Mit aller Energie!

...

---

[2]oder dem Urtext entsprechender:
Als einen Mönch zu kitzeln
An der Tonsur, nur so!

Pli bone estas kapti
Dek muŝojn de l' plafon'
Ol kapti nazkataron
Dumnokte sur balkon'!

Pli bone estas diri
Stultaĵojn, kiel mi,
Ol ronki sur fotelo
De la akademi'!

Pli bone estas fini
Ĉi kanton antaŭ fin'
Ol aŭdi la publikon
Kriegi: „Fermu ĝin!“

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Raymond Schwartz *(∗1894-04-08 – †1973-05-13).*

*Arg-802-1608 (2013-01-31 16:08:12)*

*Pri la aŭtoro vidu ankaŭ* ***http://kabareto.esperanto.cc/*** *kaj* ***http://eo.wikipedia.org/wiki/Raymond_Schwartz*** *..*

Viel besser ist's zu fangen
Zehn Fliegen im Salon
Als sich 'nen Schnupfen holen
Des Nachts auf dem Balkon!

Viel besser ist's zu reden
So dummes Zeug wie ich
Als bei 'nem Vortrag schnarchen;
Denn so was tut man nich!

Viel besser ist beenden
Dies Lied gleich und jetzt,
Als wenn die Leute schreien:
"Du hast genug geschwätzt!"

*Traduko de la Esperanta poemo "Pli bone .... (Naiva kanzoneto)" de* Raymond Schwartz *(∗1894-04-08 – †1973-05-13) en la Germanan de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2005-12.*

*MR-446-RS-2 / Arg-802-1609 (2013-01-31 16:09:32)*

*Siehe auch:* ***http://de.wikipedia.org/wiki/Raymond_Schwartz*** *. Tiu ĉi poemo estas prenita el la libro „La ĝoja podio“, eldonejo „Dansk Esperanto-Forlag“, represo 1975.*